

RAPIDE PASIS LA TEMP'



RAPIDE PASIS LA TEMP'

Eli Urbanová

K A V A - P E C H

Eldonejo: KAVA-PECH
Anglická 878, 252 29 Dobřichovice, CZ
<http://www.kava-pech.cz>

© Eli Urbanová, 2003
© ilustraĵoj: Pavel Rak, 2003

ISBN: 80-85853-67-1



MI KREAS, DO EKZISTAS

MI KREAS, DO EKZISTAS

Iam mi demandas,
kia mistera forto
min devigas verki?
Anstataŭ ĝoĝi el la vivo,
el beloj de l' naturo,
mi restas hejme inter muroj
pesante ĉiun vorton...

Tie ĉi mi ree
retro rigardi riskas...
Tie ĉi priskribas
per formo simpla, konvencia
renkontojn kun la amo...
Memkompreneble laŭ la plano...
Mi kreas, do ekzistas...

Klare, ke en miaj
versoj en Esperanto
havas sian lokon
krom pura sento ankaŭ sekso.
Nur kiom da poemoj
estiĝis dank' al superpremo
de ambaŭ komponantoj!

Evitu min, se vi ne volas,
ke tuta mondo sciu,
kiel vi amoras!

POST JAROJ

Leonka

Ŝi sin ne ŝanĝis, eĉ ne ete.
Kial ŝi diras *judaĉo*
kaj ne normale *judo*?
Kaj tio estis nur preludo!

Ŝi evidente ne konscias,
ke ŝi parolas tro laŭte,
kun superflua vervo.
Leonka, ŝparu miajn nervojn!

Kiu emas aŭskulti
iun senĉese insulti?

Tina

Ju pli intima amikino,
des pli konvena pseŭdonimo.
Mi portas kun fiero
belan kaŝnomon Cigno.
(Bonŝance ne Ansero.)

Jam kelkan fojon ŝi Kardelo
al mi menciis pri pudelo.
Mi ŝatas esti sola.
Sola kun li Virkato!
Pudelon mi ne volas.

Tina aktivas en LIGO
POR ŜIRMO DE BESTOJ.
Eble ĝin iam estos?

Andula

Se mi bone kalkulas,
do de ŝia vidviniĝo
pasis ne tuta duonjaro...
Kaj kia estas Andula?

Ŝi evidente jam en formo
min superŝutas per informoj,
kiel ŝi dormis, kien iros,
kion hodiaŭ ŝi kuiras,
eble ŝi faros nur rostbefon,
foje ĝin manĝis kun Jozefo,
morgaŭ ŝi haltos en tombejo...
Foje li trinkis ĉe mi teon.
Foje min ĉirkaŭ tablo pelis.
Tiun ni bele disŝancelis!

Iam ankaŭ ni mortos.
Mi... Andula... Intertempe
dank' al Jozefo mi en sano
transvivis ŝian raporton...

Eva

Teatro de unu aktoro.
Ĉi tie ŝi atingis gloron.

Ŝi artistino celkonscia.
Ŝi karaktero iom dura.
Ŝi ne al ĉiu simpatia...

Ŝia mirakla mnemoniko
faris el Eva fenomenon,
kiu fascinis nin publikon.

Ŝi bedaŭrinde jam legendo.
Kvazaŭ mi aŭdus ŝin ekflustri:
Ne ploru, eĉ ci ĝisatendos!

Teatro de unu aktoro.
Ĉi tie ŝi atingis gloron.

Maruŝ

Mi pensas ankaŭ pri ŝi.
Nun vidas ŝin en kuirejo
linoleumon viŝi...
Ŝi tiel ĝemis, tiel ĝemis!
Mi scias kial. Ŝia amo
portis sutanon...

Nin ambaŭ markis tempo.
Ŝi festos rondan jubileon...
Cetere en la templo
diservas jam alia pastro...
Ŝi vokis min, do mi aŭskultas.
Maruŝ lin kultas...

Al Maruŝ estos pardonite.
Mi mem ne venos en ĉielon.
Mi kiu dronas plu en peko
ĝis la mentono, ĝis oreloj,
estos ĵetita trans ferdekon...
Al Maruŝ estos pardonite.

LIBERA TAGO

Hodiaŭ li ne povas veni.

*Estas jam longe, dat' ne gravas,
ni revenadis el ia ekskurso...
Mi vidas nin, okazajn trampojn,
sur kampo... Ege larĝa kampo...
Ol kiam tiun ni transiros!*

Li havas tiom da laboro!

*Kien ni celis? Ĉu al trajno?
Ni ofte vagis tra vojo-nevojo.
Cetere eĉ tra padoj krutaj...
Mi miras, ke mi estas tuta!
Sufiĉis unu falsa paŝo — —*

Mi sola mangâs, sola trinkas.

*Tia perfekta ebenajo.
Terenio ŝajne neniel danĝera.
Ĝis nun ni regis proksimume
duonon. Nur duonon! Dume
la firmamento malbeliĝis...*

Mi estas trista. Li min mankas.

*Kiu ne timas fulmon? Nome
tuj poste sekvis averta ektondro...
Tempesto kaj ni sur la kampo.
Ĝi rekte super niaj kapoj.
Terura sperto! Brrr, hororo!*

Momenton, iu sonorilas!

SOLSTICO

Ni diras al tio solenado.
Kaj okazas tiu rito
kiel alie ol en lito
kaj realiĝas ĝi plej ofte
kiel alie ol nokte...

Ho, kiel alie ol perfekte
eksolenis mia knabo
la sepdekjaran naskiĝtagon!
Gaja sen gut' da alkoholo
kaj nul stimula pilolo!

Subite mi scias, ke ekzistas
krom la turo el eburo
kiel alie ol naturo...
Homoj, mi ĝemis pro delico,
dum ni solenis solsticon...

Alvenon de tria milenio
ni solenos en kabano.
Kiel alie ol per amo...
Se ni ne dormos. Se li povos
kaj do ne restos ĉe provo...

Ni diras al tio solenado.
Kaj okazas tiu rito
kiel alie ol en lito
kaj realiĝas ĝi plej ofte
kiel alie ol nokte...

INTER NI INOJ

Li min avertis: Pensu pri mi,
sed ne sur strato, ne sur strato,
aŭ mi koleros kaj vin batos!

Inter ni inoj – ba, li blagas.
Ja mi ne riskos mian haŭton
kaj ne transiros antaŭ aŭtoj!

Kiam mi ĉesos uzi ŝminkon?
Tuj kiam li sin ĉesos razi!
Ĝis nun nenia ŝanĝ' okazis...

Inter ni inoj – mi apenaŭ
aspektos kiel Greta Garbo
kaj li apenaŭ portos barbon...

Se li almenaŭ ne demandus
kun evidenta ironio,
ĉu mi jam zorgas pri linio?

Inter ni inoj – kio kaŭzis,
ke mi obezas? Pizo? Rizo?
Mi scias kio – dolĉaj kisoj!

Kaj li severe min admonas
kaj li sindone min karesas...
Eĉ morti al mi malpermesas!

Inter ni inoj – li min amas.
Mi lin komprenas, ne, ne miras,
nur iam tiam al mi diras:

Eli, ne lasu vin seli!



VIRO DE AGO

Laŭdire kio via mi estas?

Li ĝisatendis ĉi respondon:
– Vi estas mia tuta mondo,
mia riĉaĵo, dolĉa predo,
mia burgono, bela bebo...
Kaj li aŭskultas kaj en fino
degelas kiel virgulino...

Laŭdire kio via mi estas?

Mi jam kutimis ludi rolon
de konkeranto. Per paroloj
provas parade lin eksciti.
Mi ne kuraĝus ilin citi...
Ja tiuj faris el li ulon
bonpreparitan por kopulo...

Laŭdire kio via mi estas?

Pasioj pasis. For imagoj.
Rigardu lin! El vir' de ago
estas denove dolĉa predo,
mia riĉaĵo, bela bebo...
Dum li ronketas, mi konscias,
ke li min ĉefe emocias...

Laŭdire kio via mi estas?

FINA SOLVO

Kaj venos tag' kaj
viv' sin ŝanĝos
kaj unu el ni
restos sola...
Jen kio min jam
nun doloras...

Li ĉirkaŭprenis min pli firme.
– Hodiaŭ scias ĉiu ido,
kie troviĝas Antarktido.
Sufiĉas ŝtorm' kaj dum minuto
nin neĝo tute superŝutos...

Temperaturo maksimume
nur minus dudek! Al mi frostas!
Min interesus, kiom kostas
la flugbileto' por du personoj?
Mi pretas pagi la duonon...

Li donis al mi longan kison.
– Mi konfidencos la ideon
al kompetenta agentejo.
Ĉar ni decidis ne reveni,
ĝi ne postulos tiom de ni...

Mi ne plu plendas.
Al mi plaĉas
en Antarktido
morti kune.
Sed ni ankoraŭ
vivas, ĉu ne?

PRINTEMPA „PROMENO“

Fine degelis lasta neĝo...
Kaj li tuj: Eli, estas tempo
bonvenigi la printempon!

Li havas tiom da meritoj...
Plus tiu lia sindonemo...
Li mia ĉio... Do promeno.
Promeno nepre nepretenda,
taŭga por ni jam emeritoj...
Mi stulta tute ne konjektis,
kia „promeno“ min atendas!

Ni ne vojaĝis pli ol horon
kaj baldaŭ estis sur la loko.
Mi terurigis! Inter rokoj
sin volvas supren streta pado...
Pado, ne vojo! For humoro.
Ja mi ne riskos ian lezon!
Ŝajnis, ke li min ne persvados...

Mi malesperis. Tia alto!
Ĉu ni konkeros ĝin en sano?
Antaŭe iris li tirano,
post li stumbladis mi viktimo.
Sole escepte kurta halto
kaj ree sor... Eĉ kvarpiede!
Ĝis ni atingis la kulminon!

Pro kio propre ni klopodis?
Pro panoramo vere rava!
Jen rekompenco por ni bravaj!
Mi nur ekflustris: Dankon, kara...
Al la monteto – li aprobis,
ke mi titolis ĝin Orgasmo.
Laŭ mi la senco estas klara...

Tiel solenis ni alvenon
de la printempo. En naturo
per ĉi ekstra aventuro...

INTIME

Mi lin envias.
Se li devas
malplenigi
la vezikon,
li ne subiĝas
al paniko.
Kial ne haltus
li ĉe arbo?
Li palpas en la
pantalonon
kaj tuj turninte
sin laŭ vento
trankvile faras
la bezonon.

Nenia serĉo
de kaŝejo
kaj elpuŝo
de l' postaĵo.
Li havas tian
avantaĝon!
Al li ne povas
do okazi,
ke li eksidos
en urtikojn!
Verdire tamen,
sed nur tiam,
kiam turmentas
lin koliko!

PEONIOJ

Mi lin bedaŭras. Kian flegon
li devas doni al la bedo
por povi veni kun bukedo!
Verdaj burĝonoj. Nul miraklo...
Ĝi evidente nur okazos.
Post kelka tempo. En la vazoj.
Ĉu estas io pli mirinda
ol disflorintaj peonioj?
De nun mi scias, ke nenio!

Do kial tiu stranga tristo?
Jes, la naturo estas bela.
Sed eĉ kruela, eĉ kruela!
Ĉiu fariĝas ies predo.
Lepor' de vulpo, ŝaf' de lupoj...
Al hom' bongustas bova supo...
Komentu tion vi, leganto.
Mi vane serĉas ĝustan vorton.
Jen temo super miaj fortoj...

Dum li pragmata ĉi aferojn
prefere prenas kun humoro.
Li havas tiom da laboro!
Tamen se iom, iom eble
li ree venas kun bukedo
kaj mi fariĝas lia predo...
Kaj li min premas, ĝis mi veas,
por miliono min ne ŝanĝus...
Li plej volonte min formanĝus!

BONA SIGNO

Mi estas kaj ne estas sola.

Sur tiu vojo mi apenaŭ
renkontas homon. Kaj se tamen,
verŝajne iun kun hundeto.
Mi ne bezonas societon.
Min akompanas la herooj
de mia vivromano
Ernesto kaj Johano.
Amoj neniam forgesotaj.
Ĝis hodiaŭ mi demandas,
kiu estis pli granda...

Mi estas kaj ne estas olda.

Okazis ĉe la kuracisto.
Laŭdire ĉu min eble ĝenas
problem', pri kiu li ne scias?
– Momenton... Unun mi konscias...
La kuracisto ekatentis.
– Sufiĉas vidi ulon
kun bele longaj kruroj
kaj mi tuj iĝas maltrankvila...
Por lin citi: Bona signo.
Ni ne estas el ligno...

Mi estas kaj ne estas gaja.

Kun kia emo li ripetas,
ke al li plaĉas Neĝulino,
dum mi nur poste kiel dual!
Kun li mi simple ne enuas.
Do Neĝulin', dum mi nur poste...
Komprenu, li min flatas
kaj mi ĉi flaton ŝatas...
Zono ĵetita ĝustatempe.
Ĉiam kiam je sekundo
mi min sentas sur fundo...



AFIŜO

Iam mi tion diris jene: *Ne, mi ne havas multajn sciojn; jen kion mi neglektis, dum febre mi kolektis impresojn, emociojn.* Hodiaŭ – kiel mi tion dirus hodiaŭ? Kiel alie ol tute same...

Versoj ĉiam kaj ĉie. Versoj eĉ nun en la tramo. Ĉefe ke mi ne forgesu aĉeti mustardon... *Mustardo, masturbo...* Stop, poeto! Ci estas fakte terura!

Sed kial mi veturas tiel foren, precize sep staciojn? Nome nur tie en la vendejo kun nutraĵoj estas eble vidi aŝon, kiu min fascinas. Kiu min rekte magie altiras. Antaŭ kiu mi kapablas stari horojn, horojn... Miru, moku, frapetu al vi sur la frunton, al mi egale...

La tramo haltas. Ha, la placo! Mi descendas, singarde transiras la straton, preterpasas tabakbutikon, nove apertitan tavernon, apotekon... Jam en la pordo mi konstatas, ke tabulo kun la aŝo pendas sur sia loko tuj post la kaso. Ĉefe ke mi ne forgesu aĉeti mustardon...

Kaj estas sur tiu aŝo nek Praga kastelo, nek fama Titanic, nek Greta Garbo en la rolo de Anna Karenina... Sur tiu aŝo estas foto de viro. Propre sole de lia vizaĝo. Vizaĝo eksterordinare ĉarma. Vizaĝo kiu min fascinas. Kiu min rekte magie altiras. Antaŭ kiu mi kapablas stari horojn, horojn... Ankoraŭ en la pordo mi turniĝas por laste ekrigardi ĝin...

Apoteko, nove aperta taverno, tabakbutiko... Fine konvena tramo. Ĉi-foje mi veturos en la kontraŭa direkto. Ree precize sep staciojn... Ĉefe ke mi ne forgesis aĉeti mustardon. Por ke vi komprenu,

pipro kaj mustardo estas ŝatataj ingredientoj de mia amiko. Supo, kiun li „dece“ ne spicus, al li ne bongustus...

Koncerne lin mem, kvociento de lia inteligenteco estas nepre alta. Li reagis tiel fulme, ofte sprite. Diference de mi...

Li homo muzikema... Okazas, ke li subite, absolute spontanee komencas kanti ruse kaj mi vole-nevole pensas la paseon... Paseon ŝajne mortan, ŝajne longe tombigitan... Kaj mi aŭskultas tenoron kaj tamen aŭdas baritonon...

Nu, neniu estas perfekta. Imagu, ke li klerulo kun titolo interŝanĝas terminojn sadismo kaj masohismo! Mi sendos lin en erotikan salonon kaj prete! Kvankam prefere ne, ia tro temperamenta knabinjo povus kontuzi lin...

La tramo haltas. Vivu Veleoslavín! Vivu la valo Ŝárka! Aŭtoj, aŭtoj, aŭtoj... La avenuo Evropská kondukas al la aerodromo, tial tia trafiko. Jes, mi ĝojas hejmen... Jes, pro kelkaj motivoj... Bonŝance la barieroj restas supre, sekve la vojo trans la relojn estas libera. Mi palpas je la ŝlosiloj; per la eta mi malfermos la leterujon. Mi esperas trovi en ĝi – cetere mi lasos min surprizi... Ĉefe ke mi ne forgesis aĉeti mustardon. Kara, por vi ĉion, se mi rampus kvarpiede! Kaj kie estas la aŝiso...

FINO DE EROTIKA POETINO

Pri kio mi meditas?
Ba, pri nenio... Pri la vivo...
Ĝiaj diversaj logaĵoj...
Mi venis al jena konkludo:
Viv' estas lukto, ne ludo.

Ĉu vi ŝatas alkoholon?
Ĉefe ne kaŭzu karambolon!
Alia pretas lastan monon
doni por drogo. Lia risko!
Ankoraŭ pli min ŝokas homoj,
kiuj foriron el la mondo
solvas per salto desur ponto.
Hej! Haltu! Ja ne havas sencon
el ĉio fari tuj sciencon...

Tamen kia estos fino
de erotika poetino?
Mi simple palpos en la ŝrankon,
klare ke ne por revolvero,
ekkuŝos eble sur la plankon...
Tion mi diras ĝusta ĝuo!
Ulo min tiel ne detruos!
Kaj daŭros tiu ĉi bonfarto
laŭvorte „senza“ ĝis inkvarto...

Pri kio mi meditas?
Ba, pri nenio... Pri la vivo...
Ĝiaj diversaj logaĵoj...
Mi venis al jena konkludo:
Viv' estas lukto, ne ludo.

„HETAJRO DANCAS“ EN FOTOJ

Mi kun pupeto.

Mi jam pli granda.

Paĉjo en legiona uniformo.

Panjo.

Fratino Hela.

Prefere ne tro
rigardi retro...

Mi deksesjara el profilo.

Mi kaj Alan dum danco.
Ni stultaj! Tia amo
kaj ni disiris!

Prefere ne tro
rigardi retro...

Mi kaj Ŝtefo en kafejo.
Stadio de konkerado...

Li kun gitaro.

Mi ludanta violonĉelon.

Foto „Hetajro“.
Danĝera pozo...

Prefere ne tro
rigardi retro...

Printempo 1945.
Ne multe mankis
kaj mi forkuris
en Ruslandon.
Tamen kun Andrej...

Prefere ne tro
rigardi retro...

Julio Baghy.
Romantika rilato...
Li verkis prefacon
al mia unua Esperanta
kolekto NUR TRI KOLOROJN.

Prefere ne tro
rigardi retro...

Johano en reĝa kaleŝo.
Apud itala princino Ciano.
Rara dokumento!

Ni en montaro.

Prefere ne tro
rigardi retro...

Loki, alie Lakshmiswar Sinha.
Mi spertas serion da misteraĵoj...

Prefere ne tro
rigardi retro...

Ernesto.
Viro post tiel longa tempo!
Kaj bela, juna!

Ni du en Ŝaro.

Ni en mansardo.

Ni komparsistoj.

Prefere ne tro
rigardi retro...

Mi en diversaj tualetoj.
Kelkaj sufiĉe luksaj...

Mi amforo.

Mi staranta ĉe antikva ŝranko.
En la manoj mi tenas libron
HETAJRO DANCAS.

Prefere ne tro
rigardi retro...

REMEMORO PRI PARTERO

En ĉi kajer' mi havas notoĵn.
Estas da ili bela vico.
Kelkajn mi substrekis. Ĉiuj
koncernas la saman aferon:
rememoron pri partero.

Tie kunvenis ni poetoĵ.
Nia artisma kvarfolio.
Tie ĉe konferenctableto
ni interŝanĝis opinioĵn,
tie preparis kontribuojn
al urĝa lingvoevoluo...

Alia bild' – en kuirejo
mi legas mian manuskripton
al Josef Rumler. Jen paseo...
Preta akcepti la verdikton.
Li min aŭskultis ĝis la fino.
Ja li min faris verkistino...

Vin senkulpulon la „hetajro“
nature ŝokis. Do nul laŭdo...
Vi eĉ ripetis: Fi! Kanajloĵ!
Kiel mi diris – nul aplaŭdo...
Se vi menciis unu pluson!
Pleje vi hatis certan ruson...

Mi ne riproĉas al mi, male,
ke ni subite kuŝis kune...
Kvazaŭ ne estus tutegale,
kiu delogis kiun, ĉu ne?
Foje ni grundis en amnesto,
sed vi eskapis tra fenestro...

En ĉi kajer' mi havas notojn.
Estas da ili bela vico.
Kelkajn mi forstrekis. Ĉiuj
koncernis la saman aferon:
rememoron pri partero.

KAMIL HORÁK: POEMOJ POR ELI

Vi vane serĉus ĉi aŭtoron
en listo de ĉeĥaj poetoj.
Estante nura amatoro

li kompreneble ne atingas
nivelon de Karen aŭ Rumler,
al kiuj mi amike svingas.

Li ne aspiras iĝi fama.
Ja verkis POEMOJ POR ELI,
ĉar li min multe, multe amas.

Min inon tiel neperfektan,
de ĉiam terure mallertan,
kun mankoj korpaj, intelektaj!

Min pluraj viroj multe amis...
Neniu min nomis diino...
Kortuŝaj versoj. Dankon, Kamill!

Kaj estas liaj poemoj
malgraŭ banalaj rimoj
kvazaŭ profundaj sondoj
en homan animon...

WILLI

De certa tag' mi lin imagas
kun tek' trans ŝultron, en mantelo
laŭ lasta modo kaj ĉapelo.

Subite iu sonorigis...
Do mi rapidas al la pordo...
Jen li! Vestita kiel lordo!

De certa tag' mi lin imagas
kun tek' trans ŝultron, en mantelo
laŭ lasta modo kaj ĉapelo.

Ni paroladis pli ol horon...
Dum mi ĉe kafo, li ĉe teo...
Ni tute solaj en la ejo...

De certa tag' mi lin imagas
kun tek' trans ŝultron, en mantelo
laŭ lasta modo kaj ĉapelo.

Li estas mia grandanima
amiko Willi. Ne amanto.
Nin ligas nur, nur Esperanto.

De certa tag' mi lin imagas
kun tek' trans ŝultron, en mantelo
laŭ lasta modo kaj ĉapelo.

HONZA

Ni haltis meze de la parko.
Mi studentino... Li studento...
Ne, ne por longe! Por momento!
Memkompreneble mi je lia
demand', ĉu min jam kisis iu,
prefere diris, ke neniu...

Mizera Honza! Kial, kial...
Ĉar li min poste preterpasos
kun Alan el pli alta klaso...
Do li ne estis la unua!
Do mi rifuĝis al mensogo!
Laŭdire hontu, pedagogo!

Kaj restis al li la sarkasmo
de ofendita suvereno
ĝis nia maturekzameno...
Sed ankaŭ dum la renkontiĝoj
de ni iamaj kunlernantoj
li ne survestas al si gantojn...

Kiseto! Kion ĝi signifas
en la senlima universo?
Mi verkis tiam miajn versojn
en la gepatra... Honza, Alan...
Mi devus penti... Mi ne pentas.
Li superflue min turmentas...

PRI UNU BENKO

Nenia verso, bona verso.

Subite ŝi. – Ĉu permesite?
Ni interŝanĝis kelkajn vortojn...
Ŝi havas nepojn, familion...
Ŝi vivas strikte laŭ Biblio!

Nenia verso, bona verso.

Ŝi evidente incito.
Ŝi scias, kiel longa estis
arke' de Noa! – Sen ofendo,
ja temas sole pri legendo!

Nenia verso, bona verso.

Mi emas fuĝi... Mi ne fuĝis.
Mi plu aŭskultas ŝiajn verojn.
Eĉ folieto sin ne movos
sen la decido de Jehovo!

Nenia verso, bona verso.

Ŝi venis, vidis – kaj fiaskis.
Dum mi foriras iom trista,
ŝin ne deprimis la malvenko.
Ŝi venkos sur alia benko!

Nenia verso, bona verso.



KAZO POR DOKTORO

Ve, mi skarabeto
glitis sur pargeto!
Kia ŝok', doloro!
Kazo por doktoro!

La doktoro diris:
Mi ne ĉesas miri!
Kion ci nur faris,
ke ci tiel falis?

Ve, mi skarabeto
glitis sur pargeto!
Kia ŝok', doloro!
Kazo por doktoro!

La doktoro diris:
Mi ne ĉesas miri!
Kion ci nur faris,
ke ci tiel falis?

Ve, mi skarabeto...

RAPIDE PASIS LA TEMP'

Fine mi legos la gazeton.
Ellasos sole sportan paĝon.
Tio ĉi estas interesa,
ke perdiĝis sinjorino
proksimume okdekjara,
do en mia aĝo...

Al mi persone, bedaŭrinde,
nenion diras ŝia foto.
Nek mi renkontis ŝin vestitan
en helgriza anorako.
Plue ŝi sur la piedoj
havas nigrajn botojn.

Ŝi evidente vojeraris,
ĉar ne funkcias ŝia menso.
Ĉu vi ŝin vidis? Kiam? Kie?
Voku tuje, ni vin petas!
Por informo eĉ tuteta
dankas la parencoj.

Jes, mi min sentas kortuŝita.
Kiel ekzemple ili zorgas
pri la avinjo nekapabla!
Mi mem restas optimisma.
Se ŝi ĝis nun ne revenis,
ŝi revenos morgaŭ...

Sufiĉe pri ŝi... Ho ne, homoj,
min ne deprimas la oldeco.
Joj, per ĉampano bapti verkon
RAPIDE PASIS LA TEMP'! Ne,
mi ne dubas, ke almenaŭ
iu ĝin aprecos...

MEZE DE NOKTO

Divenu, kion mi pensas! Kion mi pensas jam kelkan nokton! Vi ne divenos tion. Ĉi-foje mi ne maldormas pro poemo. Ĉi-foje min ne lasas dormi imaginara teatraĵo. Joj, mi amuziĝas! Joj, mi ĝuas! Lumiloj en la spektejo estingiĝas... La kurteno leviĝas...

En antikve meblita apartamento ne nesimila al tiu mia promenas junulo. Li kondukas suspekto. Nun li trarigardas la ŝrankojn, nun esploras enhavon de la tirkesto... Kion li serĉas? Kion alian ol monon... Subite li rigidiĝas. Iu estas en la antaŭĉambro! Malbenite! La avinaĉo revenis! La junulo ne perdas tempon. Post la larĝe dismetita ekranego li estos perfekte kaŝita...

Momento de streĉo – kaj eniras ŝi. Ŝi ne nesimila al mi... Ŝi evidente laca... Kiel kutime ŝi haltas ĉe la foto ekspoziciita sur la komodo tuj apud la pordo. Ŝi karesas ĝin... Parolas al ĝi... Aŭskultu:

– Kaj mi estas ree ĉe vi, Ernĉjo! Vi scias, plej bone mi sentas min kun vi ĉi tie hejme. Ĉi tie vi por mi ekzistas plu kaj inverse mi kun vi mortis. Ĉi tie vi kiel iam sekvas ĉiun mian movon – domaĝe, ke nur desur la foto! Povi kun vi ankoraŭ unu fojon, unusolan fojon matenmanĝi, kiel mi ĉirkaŭsaltetus vin! Vi dume prideseĝnus al mi vian songon... Kiel mi ridus! Kun vi oni ne enuis, ej, ne! Eble tial la dudek jaroj tiel rapide pasis...

Kortuŝa monologo, ĉu? Do bone, vi pedantoj, mi pruntis ĝin el Hetajro dancas, konkrete el la ĉapitro En Ŝarka pluvos dufoje...

Cetere ŝi ĵus eksilentis... Ne senkaŭze! Ne senkaŭze! Tio, kion ŝi ekaŭdis, sonis kiel – jes, kiel softa suspiro! Ŝi instinkte turniĝas al la ekranego, alpaŝas pli proksimen – kaj teruriĝas! En la angulo kaŭras tute fremda junulo! Ĉiu normala ino konsternite ekkrius, probable eĉ svenus... Ŝi ne. Ŝi restis stari kvazaŭ ŝtoniĝinta... Tio ĉi ŝin konfuzis liaj okuloj plenaj de larmoj... La paŭzo estis kurta, la konverso konciza:

– Homo, kion vi faras en mia loĝejo? – Kiel vi vidas, mi ploras... Ja ankaŭ mi nomiĝas Ernesto... Ja ankaŭ al mi panjo diradis Ernĉjo... Se ŝi konjektus, kiel mi vivas! Ke mi vivas surstrate!

Agnosku, karuletoj, ke mia fantazio funkcias sensacie! Ĉefe ne ekdormi, ne ekdormi! Ĉar kiel vi sendube rezonis, sincera konfeso de nia junulo estis nura komenco...

Kaj ĉiu sceno estas grava kaj ĉiu aliel impresa... Kio sin ne ŝanĝas, estas la kulisoj: la antikve meblita apartamento ne nesimila al tiu mia. Tie li ĵetiĝos al ŝiaj kruroj kaj petos, petegos pri pardono... Tie ŝi ne nesimila al mi lin neglektitan pelos sub la duŝon kaj li volonte obeos... Tie li aperos duonnuda zonita per viŝtuko, ja iom tro magra, tamen bela, bela... Tie ŝi lin vestos de la kapo ĝis la kalkano kaj li ambaŭ ŝiajn manojn kovros per kisoj...

Klare, ke mia korpo adekvate reagis...

Fine mi imagas ilin ĉe la tablo. Ili matenmanĝas. Vi ne eraras, tiu ĝentlemano estas vere li... Ŝi male okulfrape juniĝis, rekte radias... Dum ŝi ĉirkaŭ-

saltetas lin, li prideseĝnas al ŝi sian sonĝon... Kiel ŝi ridas! Kun li ŝi ne enuas, ej, ne!

Jen denove la „hetajro“... Via afero, se vi tion prenos kiel reklamon...

Por ke mi ne forgesu – la foton ekspoziciitan sur la komodo tuj apud la pordo de certa tago anstataŭas vazo kun floroj...

Joj, mi amuziĝis! Joj, mi ĝuis! Lumiloj en la spektejo estingiĝas, la kurteno lante falas kaj mi aŭtorino de la teatraĵo, kiun mi neniam verkos, flustras en la tenebron jenan mesaĝon:

– Vi, kiuj restis solaj, ne estu tristaj, ne rezignaciuj, ne perdu esperon, kredu al mi sperta, mirakloj okazas...

FRINA

Kaj ornamas mian versejon
krom kelkaj originaloj
foto tondita el ĵurnalo.
Genuside pozas knabino
sur sabla plaĝo ĉe maro...
Ŝi kun humidaj nigraj haroj...
Jen seksbombo. Kial ŝi hontus?
Ŝi montras al ni la belon
desub kuspita pulovero...
Ŝi kun konko. Granda. Simbola.
Ŝi kovris per ĝi la pubon...
Ŝi en vizaĝo kiel pupo...
Por konfesi pli ol la bildoj
imponas al mi la mamoj
de ĉi kuraĝa juna damo...

Kompreneble ke mi tuj pensas
pri Frina, kies du cicoj
iam konfuzis la justicon.
Ĉu vi konas nomon Aŭtio?
Ne gravas. Li ŝin akuzis,
ĉar ŝi hetajro lin rifuzis.
Defendinto Hipereido
de Frina eksa amanto
estis nenia diletanto.
Oni notis, ke li serĉante
por feblaj vortoj apogon
fine demetis al ŝi robon – –
Mi ne miras al la juĝistoj.
La belo estas potenca.
Frina, mi al vi riverencas...

/Kompleta versio. En la literatura revuo FONTO 1933
n-ro 146 same kiel en VINO, VIROJ KAJ KANTO
(FONTO – kajeroj) 1995 ĝi miakulpe aperis sen la deka
verso./



SINJORO BAYS PARDONOS...

BILDKARTO EL OKSFORDO

Mia koleginino Agnes
havas papagon.
En ordo.

Mi havas paron
da jaguaroj.
Sur la bildkarto
el Oksfordo.

Fascina foto. Bestoj
en la momento de siesto.
Bestoj de sovaĝa belo.

Ŝi – sfinkso el profilo.
Li, evidente ŝia filo,
dormas kiel bona bebo.

Jen mi kaj vi, karulo.
Ja vi kunfermis la okulojn,
vi retiris oreletojn...

Mi gardas, dum vi kuŝos.
Ve, se vin iu nur ektuŝos!
Sfinkso tuj viviĝos, sci!

Allogaj jaguaroj
en la antikva buduaro.
Du en kadro... Du en lito...

Mia koleginino Agnes
havas papagon.
En ordo.

GLOBUSO

Por li realisto
ne tiom gravas arto.
La vazon el Vieno
li preterpasis
sen rimarko.

Foje mi ricevis
de unu mia gasto
cindrujon el Milano.
Li nur mansvingis:
Ba, balasto!

Supre sur la ŝranko
mi lokis nanan arbon
el Moskvo. Ĉu li moŝto
ĝin ekhonoros
per rigardo?

Male la globuso
en la germana lingvo
al li imponas. Pleje
el la plejado
da relikvioj.

Kiel li viviĝis!
Jen Ameriko, Kubo...
Li eĉ forgesas mangi!
Mi ne koleras.
Ludu, bubo...

Por li realisto
ne tiom gravas arto.
Sed kion ĉion scias
ĉi hom' ekzemple
pri antarkto!

PUNO POR ĈIU MONO

Kial mi volus lin provoki?
Male, nin ambaŭ same ŝokis,
kiam anstataŭ Jarĉjo
mi al li diris Joĉjo!

Kaj kie estis la virkato?
Min ĉirkaŭprenis urso
kaj antaŭ ol mi palpebrumis,
mi kuŝis sur la dorso...

Ekknaris lit'... Li energie
forŝotis la plumonon...
Tuj post ĉi ago sekvis puno.
Puno por ĉiu mono!

Vi bonvenigis tiun punon,
konfesu, egoisto!
Koncerne min, en mia sino
kvazaŭ moviĝus piŝto...

Kaj min gutadis lia ŝvito
kaj ni du ŝajnis unu
kaj mi anhelis kaj deziris,
ke li min plue punu...

Tamen eĉ puno havas finon.
La lito ĉesis knari...
Jes, mi ricevis amnestion.
Domage, kion fari?

Sed kiel fartas nia urso,
pardonon, la virkato?
Li tiel bele kantas al si...
Vi ravas min, amato!

Kial mi volus lin provoki?
Male, nin ambaŭ same ŝokis,
kiam anstataŭ Jarĉjo
mi al li diris Joĉjo!

/Tiel kaj ne alie devis ĉi tiuj tri poemoj aperi en la kolekto
EL MIA BUDUARO eldonita en Brazilo 2001, tiel kaj ne
alie!/



KONFESO

Mi vere ne scias, kiu decido estis pli peza, ĉu tiu, ke de hodiaŭ mi ne manĝos dolĉaĵojn aŭ tiu, ke mi definitive ĉesas verki...

La lastan fojon mi revenas al miaj notoj. Tute plej frue mi volis verki poemon Aerodromo. Filmo, kiun ni sekvas, nin ambaŭ kaptis. Al aviadilo celanta en Romon minacas danĝero. Laŭ informo de la polico unu el la pasaĝeroj posedas bombon. Drama situacio daŭros evidente. Ni malŝaltas la televidilon. Ni eluzos la tempon alimaniere... Eble post dudek minutoj ni ĝin denove funkciigas. Katastrofo ne okazis, la flugo finiĝis bone...

Verki poemon Spritulo estus nepre pli facile. Mi ne bezonas voki metiiston. Vi scipovas ĉion. Ekzemple nun vi kuŝas sur la planko kaj penas trabati muron en la kuirejon. Pro eta truo tia bruoj! Vi en iom loza sportkalsono. Interesa pozicio...Laŭdire ne gravas, sed vi postulos alpagon!

Plue mi planis rakonti pri homoj, kiuj iel impresis min, konkrete pri ŝi ankoraŭ juna, mi ŝin renkontis survoje al la magazeno, pri ŝi en bela somervesto, pri ŝi, kies liva maniko montriĝis vaka, ĉar ŝi, ho ve, estis senbraka... Pri ŝi kaj multaj aliaj...

Ĉi tie mi legas: Mi rajdas sur Pegazo, ĝi ne obeas, alten prancas, ni malrapide nur avancis... Kaj ĉi tie: Vi estas maro, mi Saharo... Kaj ĉi tie: Aha, Praha! Kaj ĉi tie: Ajajaj – ĝojo, ojoj – doloro...

Domaĝe pri la temo Macocha. Unika spektaklo. Stalaktitoj pendas el plafono de la kaverno, stalagmitoj kreskas el ties grundo, ie tie ili ligiĝas por

krei stalagnatojn... Simila miraklo amo estas, ja ofte ĉe sopiro restas...

Mi preskaŭ preterrigardis jenan scenon: Nigraj infanoj konsumas kaĉon. Ili estas kelkaj, sidas surtere ĉirkaŭ granda poto, disponas unusolan kuleron, kiun ili senvorte kaj discipline transdonadas al si...

Mi ekstaras de la tablo. Morgaŭ mi forportos miajn notojn en specialan kontejneron. Mi baldaŭ okdek-jara... Mi konfesas, ke por trakviligi min mi permesis al mi preni peceton da ĉokolado...



MIAJ INFANOJ

Poemoj el la jaroj 1951–1958

NOKTA PAPILIO

Flirtpapilie sur podi'
soldancas mi sur ruĝa lamp'.
Jen mia sun' kaj mia kamp'.
Flugilo mia: melodi'.

Min vane sekvus retkarcer'.
Dum flirtaflug' al plena bril'
mi tuŝas ĉiun kun facil'
celante al pli alta sfer'.

Kaj tamen rompos iam sven'
la flugon supren al amant',
sed antaŭ fin' de l' dolĉa kant'
mi mortos post kurten'.

/Esperantista – aprilo 1951/

AMSEZONOJ

Printempa amo – flirta sent',
kaprica kiel maja vent',
lepora salt' en malkviet',
burgona kant' de la poet'.

Pasiaj amoj de l' somer' –
ĉieltoastoj kun infer',
sangruĝaj rozoj en buked'
ŝiritaj sur edena bed'.

Malfrua amo de aŭtun' –
post nuboj palas laca sun',
la tulpoj sinke klinas sin,
vualas koron svenpatin'.

La vintra am' – velkinta flor'
jam senkolora, sen odor',
ĝin kovras ŝirme neĝa fel',
tapiŝo blanka al ĉiel'.

/Esperantista – junio 1951/

JAKTO

Antaŭen jakto nia celas,
favora vent' ĝin pelas,
jen, alten ŝvelas blanka vel'
al la ĉiel', al la ĉiel'.

Facile ĝi sur akvo glitas,
amike ĝin invitas
la rozkolora horizont'
post blua ond', post blua ond'.

Rapidas ĝi sur marnivelo
laŭ sunradia relo
renkonte al la aventur'
sub la lazur', sub la lazur'.

Vespere nia jakt' revenos,
sin al la bord' alpremos
kaj dormos kiel etinfan'
en verda kan', en verda kan'.

Ĝin zorgos kun stelaro
la luno super maro
kaj lulos ĝin per sorĉa lir'
dum nokt' Zefir', dum nokt' Zefir'.

/Esperantisto slovaka – decembro 1951/

BARKAROLO

Silentas la maro dormanta,
karese sonas barkarol’;
sur ondoj kun paro amanta
balance naĝas la gondol’.

Ĉirkaŭe nur akvo helblua –
tre sorĉa, rava panoram’;
aperis la stelo unua,
avizo grava de la am’.

Sulkiĝas jen ondo post ondo
kaj ĉiun sekvas dolĉa kis’
kaj ardas la ĵuroj; la mondo
fabela ŝajnas paradiz’.

La nokto de l’ amo jam pasas,
sin laste kisas juna par’,
la steloj ĉielon forlasas,
la ĵuroj – dronas en la mar’.

/Esperanto – junio 1952/

LUNA NOKTO

Arĝenta Lun', ĉiela suvereno,
de stel' al stel' flirtanta kavalir',
vidante vin naĝanta tra l' kurteno
etendas mi la manojn pro admir'.

Promeni nun sur mola herbopluŝo
en bosk' betula plena je parfum',
sen vestkiras' ekdanci sub rosduŝo
kovrite nur per via brila lum'!

Kaŝludos mi kun vi, arĝenta Luno,
dum virtuoze trilos najtingal',
vi serĉos, serĉos – fine en laguno
atingos min la svene vibra pal'.

/Verda Voĉo – aŭgusto 1952/

MIAJ INFANOJ

Animon mian
vibrigas ofte la sopir'
je iluzi';
dum pompas fantazi',
mi koncipita de inspir'
estadas.

Por longe fuĝas
trankvilo ĉiu kaj kviet';
en la ferment'
de fajre brula sent'
sin trajtas klare poemet'
embria.

La streĉ' kulminas
kaj kristaliĝas penskonker'
sub plumretuŝ';
min ŝiras la akuŝ',
sed kron' poenta tra l' sufer'
jam brilas.

En vers' vinditaj
ridetoj, ĝemoj de la kor',
mi amas vin
jen kiel la patrin'
infanojn siajn en dolor'
naskitajn.

/Esperanto – novembro 1952/

STRANGA KAPTAĴO

Ĉe roka bordo bobelas
kapricaj ondoj en la sun',
ruliĝas tie kaj ŝvelas
kaj ŝaŭme cedas nun.

Por petoladi multmove
revenas ili de la fund',
perliĝas, poste denove
murmuras en profund'.

La maro muĝas agorde;
songante pri la orfiŝet'
fiŝisto juna surborde
dormetas en kviet'.

Li longe kuŝas lulite,
rideton mildan sur la buŝ',
jen – vangon lian subite
aspergas densa duŝ'.

Leviĝas alte la maro,
baraktas io en la ret' –
kaptiĝis ora hararo
de mara virinet'!

/Esperanto – majo 1954/

VANA SOPIRO

De l' bordo sonas violono...
Ondoj boaton balancas...
La luno kiel lampiono
super la maro dancas...

Vual' krepuska delikata
noktajn fantomojn vivigas...
Al fantazio nebridata
la melodi' instigas...

Mi dolĉe revas pri najado;
ĝi elmergiĝos el ondoj
kaj de l' elasta moviĝado
ŝaŭme briletos rondoj...

Jen – io kirlas akvon mole!
Vanas vi, mia sopiro!
Turniĝas tamen mi scivole
kun retenita spiro.

/Esperanto – junio 1954/

MI AŬDIS ESPERANTAJN KANTOJN

Ho, melodio dolĉdolora!
Ho, verso, verso vi sonora!
Unika tuto de du ĉarmoj
ree inspiris min ĝis larmoj.

Se aŭdas mi la vortojn flui:
Flavaj grenkampoj ritme ondas.
Se aŭdas mi la arpeĝojn brui:
Verdblua maro fone tondras.

Ja kia forto! Kia vivo!
Kaj iu diras: Lingvo arta.
Verko kreita por arkivo.
Ne estas vero. Eĉ ne parta.

Ho, melodio dolĉdolora!
Ho, verso, verso vi sonora!
Min ne kalkulu en dubantojn.
Mi aŭdis Esperantajn kantojn.

/The North American Esperanto Review – julio 1954/

KONVERTIĜO

Mi volis travivi miraklon,
jes, ian okultan spektaklon,
se eble, do pruvon kelkoblan;
nur tio konvinkus min sobran.

Amego! Amego! Miraklo!
Malofta okulta spektaklo!
Metante eĉ pruvon sennombran
vi nepre konvinkis min sobran.

/Tagiĝo – septembro 1958/



LETERO AL KOMENCANTAJ POETINOJ

Do ankaŭ vi, kvankam longe adoltaj, konservis al vi ĝis hodiaŭ naivecon de adoleskantoj, sed antaŭ ĉio internan bezonon skribi. Do ankaŭ vi estas plenaj de impresoj, emocioj, reminiscencoj. Mi scias – la vivperipetioj! Oni portas la temojn en la kapo kiel pezajn ŝarĝojn. Kaj la tempo pasas... Ne timu! Bonaj ideoj ne perdiĝas. Ili revenas kvazaŭ maturiĝintaj. Ne, vi ne sidos super papero mordante krajonon. En via animo ne transrulos sin seka sablo, dunoj. Male, fariĝi oazo por mortlacaj viv-vagantoj soifaj je iom da belo!

Domage – lernejo por la poetoj ne ekzistas. Restas alproprigi al si teknikon de la versarto, prenu, kie prenu. Respondon je fundamentaj demandoj vi trovos en PARNASA GVIDLIBRO de Kolocsay-Waringhien. Kiel vi povis labori sen ĝi? Sen ĝia rimaro? Vi posedas PAG kaj PIV. Utilegaj volumoj. Sufiĉas ekfoliumi kaj momenta embaraso estas for. Ankoraŭ io: via intima notkajero. Vi pravas, ke vi ne fidas kison de muzo, estas necese armi sin kiel en batalon.

Ĉu ne, kiam ni finas poemon! Kiam ni, ofte kun teren pendanta lango, alrampas ĝis la poento! Kiam ni post tagoj de duboj pri la rezulto, venke ekvokas: Prete! La lasta vorto apartenas tamen al tiuj, por kiuj ni verkas. Al kiuj ni laŭeble kontaktas por spiri impulsan atmosferon. Por konvinkiĝi, ĉu ili nian poezion komprenas, ĉu ili ĝin ŝatas, ĉu ni kiel poetoj ion al la homoj donas.

Mi mem aŭskultas voĉojn de miaj legantoj, precipe tiujn kritikajn, tre atente. Permesu citi almenaŭ du: „Kial tiel pesimisme? Vi devus la homojn fortigi kaj ne deprimi, vi devus lukti por io!“ „Interesos vin, ke s-ro X ĉiumatene legas vian Matenmanĝon presitan en ESPERANTISTO SLOVAKA; perdinte la edzinon li travivas precize la samon!“

Kial ne konfesi, ke mi per la ciklo Sola inter homoj sekvis propran terapion? Ke mi, senespera, serĉis savon en la kreado? Tio ne signifas, ke mi ne scias, kion mi volas kiel aŭtoro: Mi provas demonstri sur mi mem, ke homa sento povas esti granda, granda ... Kaj evidente eĉ malgajaj poemoj ne estas vanaj...

Sed tiam en la jaro 1958 mi estis freneze feliĉa! Aŭdu, kiel mi, intervjuata de SUDA STELO, respondis la demandon, kiun nuntempan problemon mi konsideras plej grava:

„La plej grava problemoj... estas paco inter la popoloj. Por ke ĝi efektiviĝu, por ke ĝi estu justa kaj daŭra, necesas bazigi ĝin sur kvin pacprincipoj de hinda „panĉa ŝila“: neatakado, neenmiksiĝo, obstine kaj ĉiam severe paroli la veron, ĉiun homon lasi vivi propravole, persista kunlaboro“.

Post la distanco de 27 jaroj mia opinio ne ŝanĝiĝis. Mi plu supozas, ke al la socia aranĝo de nia planedo diros sian vorton la tiel nomata tria mondo. Jes, akcepti el diversaj jam kurantaj praktikoj tion plej bonan, por ke la homoj povu vivi sen timo pri la morgaŭo!

Kaj nun – nun imagu, ke mi invitis vin en mian modestan versejon! Eĉ se mi riskas, ke vi perdos pri mi, nome mia talento, ĉiujn iluziojn! Aliflanke kial mi farus sekreton el tio, ke laboro de ni, konsciaj poetoj, povas esti ne nur solida, ne nur respondeca, sed ofte peza? Per tio mi neniel trudas al vi mian labormanieron, kiu aspektas jene:

1. Preparo. Agrabla stadio, dum kiu mi pli multe meditas ol skribas. Kion ĉion mi ŝatus prilabori! Klare, ke mi elektas temon, kiu min logas kaj samtempe jam tro ĝenas. Mi tuj komencas koncentriĝi je ĝi. Hejme, dum dimanĉa promeno... Naskiĝas naci-lingva skizo en prozo. Logika, tre detala rakonto. Ĝia versio en Esperanto estas jam pli libera, pli poezia, trametita de belsonaj esprimoj, trafaj frazoj, rimoj...

2. Formo. Tasko ege, ege malfacila. Mi timas, ke mi fiaskos. Kaj tute regule: stumblado trans diversajn mokindajn provojn, naŭzo, emo rezigni, pento... Mi surskribas proksimume tridek paĝojn antaŭ ol mi gajnas materialon, el kiu mi kungluas strofon, kiu plaĉas al mi kaj servos al mi kiel modelo. Uf, uf! Tajpinte ĝin mi longe esploras ĝin per okuloj...

3. Konstruo. Kaj kvazaŭ mi konstruus dometon: Mi metas brikon al briko, malrapide, zorge, kun sankta pacienco... Kaj mi nur gardas min, ĉu mi ne deflankiĝas de la ĉefa ideo, ĉu mi metie ne ripetiga... Mi promesas al mi, ke ĉi-foje mi estos nepre pli disciplinita, ke mi almenaŭ lavos vazaron, kaj mi ree skribas kaj skribas kaj ne povas ĉesi kaj denove trinkas kafon el malpura taso... Simple

super poemo mi estas boemo... Kaj intertempe la vilao kreskas... Vilao ne nur stabila, ne nur oportuna, sed ankaŭ bela, kortuŝa, ekscita! Tiam oni ne preterpasos indifere!te!

4. Poluro. Nur ne antaŭĝoji! Mi konas tion! Mi ŝanĝos vorton, vorto rompos version, verso detruos strofon, strofo disfaligos poemon! Ankaŭ tio okazas, ke mi cerbumas super ia ŝajne neglektinda bagatelo kaj ne kaj ne la nukseton elŝeligi... Konkize mi poluras la aĵon tiel longe, ĝis mia poeta konscienco estas kristale pura... Kaj sekvas ripozo. „Dolce far niente.“ Minime centfoje mi flustras al mi unuopajn fragmentojn, la tuton... Antaŭ la dormo... Vekiginte... Kaj mi miras, kion mi skribis! Kion mi kreis el nenio! Ĉar kompreneble la lasta poemo estas ĉiam plej bona!

Karaj koleginoj, mi fermas mian flugan leteron dezirante al vi ĉiuj sennombrajn sukcesojn en via poetina kariero!

Eli Urbanová

Glosoj:

boemo – senkonvencia artisto

„dolce far niente“ it. – dolĉa nenionfarado

/KVARFOLIO, literatura suplemento al revuo PACO,
eldonita de Ĉeĥa Esperanto-Asocio en Prago 1985/



BIOGRAFIO

Eli URBANOVÁ (origine Eliška VRZÁKOVÁ) naskiĝis la 8-an de februaro 1922 en Čáslav (Ĉeĥio). Ŝi studis en la pedagogia faka mezlernejo, kie ŝi sukcese trapasis la maturec-ekzamenon en 1941. Senpere post la studoj ŝi eklaboris en la privata muzika lernejo de profesoro Urban, kiu fariĝis pli poste ŝia edzo.

La unuajn informojn pri Esperanto ŝi akiris de la elstara ĉeĥa aktoro Karel Höger, ŝi esperantistiĝis en la jaro 1948. Ŝia intervjuo kun K. Höger aperis en la revuo „Starto“ 1975. Membrino de la praga Esperanto-klubo ekde 1949. Ŝi plurfoje partoprenis en la Somera Esperanta Kolegio en Doksy. Per la sukcesaj ekzamenoj ŝi akiris la atestojn pri la lingvo-scio en 1950 kaj pri la kapablo instrui Esperanton en 1951.

Eli Urbanová komencis verki, unue en sia gepatra ĉeĥa lingvo, jam kiel dektrijara knabino, nome en la jaro 1935. Pro siaj sep rakontoj, publikigitaj en la gazeto *Národní osvobození* (Nacia liberigo) ŝi ricevis laŭdan leteron de la elstara ĉeĥa verkistino Marie Majerová. Kvin ŝiaj versaĵoj aperis en la regiona revuo *Podoubraví*. En la jaro 1940, kiam ŝi estis dekokjara studentino, librovendisto Malý eldonis ŝian poemaron *Zrcadlo* (Spegulo) sub la pseŭdonimo *Eliška Doubravská*. Ŝia metodika helpilo por edukistinoj ĝisatendis du eldonojn, la unuan kun la titolo *Aby byli lidmi* (Por esti homoj) 1975 en Distrikta Pedagogia Instituto, kaj la duan 1984 en Ŝtata Pedagogia Eldonejo sub la titolo *Besedy s dětmi* (Interparolo kun infanoj).

Inspira estis ŝia korespondado kun la fama hungara Esperanta poeto Julio Baghy, kiu daŭris ekde 1952 ĝis 1977. Ŝi mem tiutempe jam intense verkadis la Esperantan poezion kaj estis dekdufoje premiita. Post la divorco 1955 ŝi revenis al la instruista profesio. 1956 estiĝis Internacia Verkista Asocio – ŝi estis unu el 20 kunfondintoj. Ŝi partoprenis en la Universalaj Kongresoj en Sofio 1963, Budapeŝto 1966 kaj Prago 1996. Ŝi intense aktivis kiel Esperanto-instruistino en diversaj kursoj – ekz. por komencantoj en *Pionýrská ŝtafeta* (Pionira stafeto) kaj en la angla Barlastono. En la jaroj 1975–1977 ŝi laboris en la prijuĝa komisiono por la originala Esperanta poezio ĉe Belartaj konkursoj de UEA. Ekde la j. 1980 ŝi laboris en la Artliteratura Sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio (fondita de Jiří Karen), ekde 1983 en la nove fondita Esperantlingva Verkista Asocio (EVA), ekde 1990 en la ĉeĥlingva *Obec spisovatelů* (Komunumo de verkistoj). 1996 en la ĵurio por la originala poezio de Esperanta festivalo en Verono.

En la jaro 1972, kiam ŝi jubileis, ŝi estis envicigita en la ĉeĥan Kalendaron de kulturaj-politikaj-sciencaj jubileoj, kie estis menciite, ke temas pri la konata Esperanta poetino. Dum la jardeko 1974–1984 ŝi propagandis Esperanton en la ĉeĥaj gazetaro, radioelsendoj kaj televido. Anoj de la Esperanto-rondeto, kiun ŝi gvidis enkarde de la lerneja klubo en Praha 8, korespondis kun 30 landoj.

Pro la grandaj meritoj sur la kampo de la Esperanta poezio, propagando de Esperanto kaj ties

instruado, ŝi estis plurfoje honorita. De Ĉeĥa Esperanto-Asocio ŝi ricevis honoran diplomon en 1979 kaj la honoran membrecon 1982, de Mondpaca Esperanto-Movado honoran insignon 1980. 1994 aperis ŝiaj biografiaj indikoj en la 14-a eldono de *International Authors and Writers Who's Who*. En la jaroj 1986–1995 unu el du virinoj en Akademio de Esperanto. Ekde la Universala Kongreso de Esperanto en Prago 1996 honora membreco de UEA.

Eli Urbanová estas precipe Esperanta poetino. Ŝian voĉon oni konas en Prago, sed ankaŭ en Budapeŝto, Londono, kie ŝi deklamis siajn poemojn. Krom ŝi mem, ofte prezentadis ŝiajn poemojn, kun alta kompetenteco, elstara aktorino kaj eminenta esperantistino Eva Seemannová.

Poemoj de Eli Urbanová aperis en pli ol 30 Esperantaj periodaĵoj. Poem-kolektoj aŭ specimenoj el ŝia kreado estas ofte prezentataj en diversaj Esperantaj verkoj, oni citu almenaŭ: **Skizo pri la Esperanta literaturo** (Novobilský 1956), **Esperanta Antologio** (Auld 1958 kaj 1984), **Esperanto – lingvo internacia** (Berka 1967), **Interesa legaĵo** (Berka 1967), **25 jaroj** (Hungara Esperanto-Asocio), **Panoramo de Esperanta literaturo** (Ĝivoje 1979), **Niaj aŭtoroj sin prezentas al vi** (Artliteratura Sekcio de ĈEA 1980), **Baza Literatura Krestomatio** (Hungara Esperanto-Asocio 1982), **En la koro de Eŭropo** (Ĉeĥa Esperanto-Asocio 1983), **Kvarfolio** (Ĉeĥa Esperanto-Asocio 1985), **Poemaro por paco** (UEA 1986), **Speciale por Henri Vatré** (Iltis 1988), **Tute eta nekompleta antologio el la nuntempa ĉeĥa**

poezio (Ĉeĥa Esperanto-Asocio 1989), **Ek al leg'** (du kajeroj, Bulgara Esperanto-Asocio 1991), **La Stato kaj Estonteco de la Internacia Lingvo Esperanto** (KAVA-PECH 1995). La poemoj de Eli Urbanová ekscitas vivan intereson, pri tio atestas ankaŭ tio, ke ili estis tradukataj en plurajn lingvojn – en la anglan, bulgaran, ĉeĥan, hungaran, italan, kroatan, neder-landan, polan, serban. Unu poemo estis publikigita ankaŭ en brajlo. Kelkaj poemoj estis ankaŭ muziki-gitaj, ekz. „Rozo“ fare de Bohdan Gselhofer (la premiero estis 1967 okaze de la 80-jariĝo de Esperanto, ĉeestis gastoj el 6 landoj). Por la teksto „Paco“ komponis muzikon Otakar Maršík, tri poemojn – „Ho, tagoj dolĉamaraj“, „Konvertiĝo“ kaj „Peza vino“ – muzikigis Vlasta Šmejkalová kaj plurfoje prezentis operkantisto Miroslav Smyčka, la poemojn „Ne multe mankis“, „Sorĉistino“ kaj „Malvarma edzino“ muzikigis Rob Vetter el Nederlando.

Eli Urbanová estas aŭtorino de ses originalaj kolektoj: **Nur tri koloroj** (Stafeto 1960), **El subaj fontoj** (Ĉeĥa Esperanto-Asocio 1981), **Verso kaj larmo** (Iltis 1986), **Vino, viroj kaj kanto** (Fonto 1996), **Peza vino – Těžké víno** (KAVA-PECH 1996), **El mia buduaro** (Fonto 2001). La ĵus eldonata kolekto **Rapide pasis la temp'** estas fakte la sepa.

Krom la supre menciitaj poemkolektoj vekis grandan atenton ŝia aŭtobiografio **Hetajro dancas** (Fonto 1995). La aŭtobiografio, kiun oni povas nomi malkaŝa, eĉ provoka, kun la intensa eĥo. Pri la estiĝo

de la libro sendube meritas Josef Rumler, kiu ĝin legis la unua. El la eĥoj kaj recenzoj oni citu almenaŭ: „...ĉio estas komunikebla.“ – (Josef Rum-ler); „Uf! Nekredeble! Ĉu tio eblas en Esperanto? Ĉu la movado tion eltenos? Io tia ne ekzistas ĉe ni, kaj en kelkaj literaturoj tiaj libroj kapablas abrupte haltigi promesplenajn karierojn kaj kaŭzi politikajn krizojn.“ – (Ulrich Becker). La sepa ĉapitro de „Hetajro dancas“, titolita „En Ŝárka pluvas dufoje“, verkita kiel monologo, apartenis al la repertuaro de Eva Seemannová, kiu ĝin prezentis multfoje, kaj en Esperanto kaj en la ĉeĥa.

Eli Urbanová gajnis por sia „hetajro“ **premion de OSIEK** (Organiza Societo de Internaciaj Esperanto-Konferencoj) dum la konferenco okazinta en **Strážnice** (Ĉeĥio, Suda Moravio) **2001**. En ĉi tiu konferenco partoprenis 40 esperantistoj el 12 landoj. „Hetajro dancas“ estis elektita por la premio per sekreta balotado kaj deklarita „Libro de la jaro“.

ENHAVO

MI KREAS, DO EKZISTAS

Mi kreas, do ekzistas	8
Post jaroj	9
Libera tago	13
Solstico	14
Inter ni inoj	15
Viro de ago	19
Fina solvo	20
Printempa „promeno“	21
Intime	23
Peonioj	24
Bona signo	25
Afiŝo	29
Fino de erotika poetino	31
„Hetajro dancas“ en fotoj	32
Rememoro pri partero	35
Kamil Horák: Poemoj pro Eli	37
Willi	38
Honza	39
Pri unu benko	40
Kazo por doktoro	43
Rapide pasis la temp'	44
Meze de nokto	46
Frina	49

SINJORO BAYS PARDONOS

Bildkarto el Oksfordo	54
Globuso	55
Puno por ĉiu mono	57
Konfeso	61

MIAJ INFANOJ

Nokta papilio	66
Amsezonoj	67
Jakto	68
Barkarolo	69
Luna nokto	70
Miaj infanoj	71
Stranga kaptajo	72
Vana sopiro	73
Mi aŭdis Esperantajn kantojn	74
Konvertiĝo	75
Letero an komencaj poetinoj	79
Biografio	85

KAVA-PECH

Turismaj servoj por grupoj kaj individuoj:

- fakaj aranĝoj (kongresoj, seminarioj, vizitoj de produktoj)
- aranĝoj de nuptoceremonioj kaj festenoj en historiaj ejoj
- kulturaj kaj sportaj aranĝoj, diversspecaj festenoj
- perado de tranoktoj en Prago kaj aliaj lokoj en Ĉeĥio

Servoj de profesia eldonejo:

- eldonado de verkoj laŭ propra eldonplano en kelkaj lingvoj
- eldonoj laŭ mendoj (ankaŭ malgrandaj eldonkvantoj)
- kompleta teknika preparo de manuskriptoj por preso
- eldonado de katalogoj, bildkartoj, prelegkolektoj, ...

Tre bona rilato inter kvalito kaj prezo!

K A V A - P E C H

(Kongresa kaj Kleriga Entrepreno de Petro Chrdle)

Anglická 878, CZ-25229 Dobřichovice (Prago)

Http://www.kava-pech.cz, rete: info@kava-pech.cz

Eli Urbanová: Rapide pasis la temp'

Eldonis: KAVA-PECH kiel sian 77-an eldonaĵon,

la 35-an en Esperanto

Ilustris: Pavel Rak

Kovrilpaĝo: Luděk Neuzil (uzante motivon de Pavel Rak)

Provlegis: Gerrit Berveling, Jaroslav Mráz

Presis: UNITISK s. r. o., Prago

2003, la 1-a eldono